

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio. Vi aŭdas prelegon de Claude Gacond, prezidanto de Esperanto-Edukistaro de Svislando, pri la eklerno de fremda lingvo.

Kiam mi anoncas al novaj gelernantoj ilian unuan lecionon de la germana lingvo, mi tiam diras al ili : jen via tasko por morgaŭ : alportu por la germana leciono kartonan skatolon, ekzemple per kiu vi poŝte ricevis vestaĵon okaze de perkataloga aĉetado.

Vi pensos : kiun rilaton povas havi la germana kun skatolo ? La gelernantoj tion ankaŭ pensas. Por ili estas mistero, kiun mi ne klarigas, kaj pro tiu mistero neniu forgesas sian skatolon !

Kaj jen kiel komenciĝas la instruo de la germana lingvo. Mi disdonas al la gelernantoj ĉizilon kaj liniilon, kaj petas, ke per la kartono de la skatolo ili faru plej multe da kartonetoj mezurantaj 5 cm sur 3,5 cm. Mi lasas ilin labori dum kvaronhoru kontrolante la kvaliton de la produktado ! Kiam mi konstatas, ke ĉiuj infanoj fariĝis bonaj kartonet-fabrikantoj, mi ĉesigas tiun laboron. La infanoj ricevas la novan lernolibron, kie ni malkovras sub ses bildoj la ses unuajn lernendajn vortojn : der Tisch (la tablo), der Baum (la arbo), das Fenster (la fenestro), das Blatt (la folio), die Türe (la pordo) kaj die Blume (la floro). Dum ni ekzercas la prononcon kaj ekzamenas la ortografion de tiuj vortoj, ni ilin samtempe kopias per ruĝa koloro sur la kartonetoj. Ni poste turnas la kartonetojn sur la alian flankon kaj skribas en la franca (la lerneja lingvo de tiuj infanoj) la tradukon, tio per blua koloro. Ĉiuj infanoj provas ilin rediri, ĉu el la franca germanen, ĉu el la germana francen, kaj turnante siajn kartonetojn ili mem kontrolas sin. Se estas ĝuste, ili metas la korespondan kartoneton dekstren, se estas malĝuste maldekstren. Ni konkuras, gratulas la gajnantojn kaj rekomencas, ĝis kiam ĉiuj parkeras tiujn ses vortojn. Tio iras tre rapide !

Kaj poste mi klarigas al tiuj gelernantoj, ke ili ricevis studmetodon, kiun mi volas, ke ili uzu kun fideleco dum la tuta jaro. Ĉiufoje kiam ili trovos novan vorton (ĉu en lernenda vortlisto, ĉu en la vortaro dum tradukado) ili devos noti ĝin sur kartoneto laŭ la hodiaŭa metodo. Kaj poste, ili devos regule ripeti la tutan vortprovizon, ĉiusemajne se ili estas bonaj, pli ofte ĝis ĉiutage, se ili pene lernas tiujn vortojn. Kiel fari : simple meti ĉiujn vortojn sur la tablon kaj ilin sisteme traduki. Se estas hezito, en la maldekstran skatolon, se estas ĝuste en la dekstran. Poste estas necese plurfoje ripeti la vortkvanton de la maldekstra skatolo. Oni rajtas diri « mi scias miajn germanajn vortojn », nur kiam en la maldekstra skatolo ne plu troviĝas kartoneto post ripeto.

Se mi menciis al vi tiun metodon, tio estas, ĉar ĝi povas vin helpi persone. Vi ĉiuj certe konas la problemon de la krokodilado. Kelkaj esperantistoj retroviĝas, ili provas uzi la internacian lingvon, kaj subite pro manko de fakaj vortoj ili forlasas esperanton por sia gepatra lingvo. Tiel farante ili ne progresas en la monda lingvo. Esperantistoj devas sin devigi serĉi ĉiujn nekonatajn radikojn kaj ilin noti por povi ilin lerni. Kial ne ilin noti sur kartonetoj, kaj poste, en la komenco de ĉiuj kunvenoj rapide cirkuligi la kartonetojn ĉe ĉiuj kunvenantoj laŭ ilia alvenvico por devigi ĉiujn riĉigi sian vortprovizon.

Sed ne nur ekzistas esperanto. Vi eble studas alian lingvon, kaj sentas, ke konstante iuj vortoj inter si miksiĝas en via memoro. Tio okazas, ĉar ofte ili troviĝas en la sama vort-listo dum vi ilin unufoje devis lerni. Vi tiam rimarkos, ke la metodo havas grandan avantaĝon : neniam la vortoj sin sekvas laŭ la sama ordo, kiel okazas ĉe vortlisto aŭ kiam oni notas vortojn lernendajn en kajero.

Nun, ni revenu al miaj gelernantoj. De si mem ili sekvos la plej facilan vojon. Tio estas, ili nenion daŭrigos. Do la instruisto devas esti tre kontrolema en sia pedagogio. Almenaŭ ĉiumonate mi kontrolas, dum la unua instrujaro de la germana, ne nur ĉu la gelernantoj scias

siajn vortojn, sed ĉu ili ilin skribis sur la kartonetoj kaj tio per taŭgaj skribo kaj ortografio. Tiel, kiam ili forlasos la instruiston, ili estos akirintaj la fundamenton de la lingvo (tion ili rapide forgesos) sed samtempe metodon por lerni fremdan lingvon (tion ili malpli facile povos forgesi, ili nur povos tion ignori, se ili estas mallaboremaj).

Ofte post kelkaj jaroj gelemantoj revenis al mi por min danki pri la metodo kaj montri, ke ili ĝin uzis por la studo de la latina aŭ greka lingvoj, aŭ de la angla, aŭ eĉ de alia afero ; matematikaj formuloj, historiaj datoj, kemiaj simboloj.

Mi parolis pri la germana instruo, sed instruante esperanton mi ankaŭ uzas tiun metodon. En kursoj por plenkreskuloj mi ĝin ankaŭ proponis, kaj ĝi interesis multajn kursanojn, ĉefe la plej laboremajn. Kaj se vi havas infanon, kiu malfacile sekvas la lernejon, helpu lin hejme provante tiun metodon, vi eble rimarkos progreson.

Vi aŭdis prelegon en esperanto el Svislando. Parolis Claude Gacond pri la eklerno de fremda lingvo.

Ni rememorigas al vi, ke Radio-Svislando havas po kvar esperantajn elsendojn semajne: lunde kaj merkrede je la 13a horo 20 kaj ripete ĵaŭde kaj sabate je la 22-a horo 15. Serĉu niajn elsendojn sur la bendoj 31 kaj 48 metroj.

Ĝis reaŭdo!

-oOo-